# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetotekolanti.com/kajeroj/k88.html




# Mortis Ludoviko!


Nº 88ª Januaron al marto de 2012

Redaktore

# Ĝisante ĝisostan amikon, ĝisostan esperantiston

Pensis mi, ke neniam mi verkus ĉi tiun artikolon, ke al mi neniam pezus mia animo tiom dolore rakonti al vi pri novaĵo, kiun ne pro tio, ke ni ne atendis, estus tion malfacile diri: ne plu ni aŭdos lian ridon, lian kritikon, lian akutan aserton pri Esperanto, pri esperantistoj, pri nia lando, niaj politikistoj, pri niaj diversaj aferoj: **Ludoviko Pérez Óvilo ne plu estas inter ni**!

Kelke da tempo post kiam mi venis vivi en Mursjon, kolego rakontis al mi, ke pro kelkaj malfaciloj, sia edzino devis viziti psikiatron, tre kormolan homon, kiu ridigis lin kaj lian edzinon, tiom multe, ke baldaŭ ili du *ne memoris pri la problemo, kiu portis ilin al psikiatra konsultejo pro tio, ke anstataŭ trista, la edizno malferme ridis kaj ŝajnis ĝui vivon*. Jes, tia estis Jozefo Ludoviko Perez Ovilo: li estis plenplena da vivo kaj ĉiu, kiu parolis kun li estis gratulata de rido kaj vivoamo. Kaj li, mia kolego, tuj pensis pri mi pro tio, ke la psikiatro parolis al ili pri Esperanto, la revolucia lingvo. Li antaŭe aŭdis pri tio, ĉar mi jam parolis al li pri ĝi, kaj tiu kolego, Johano, kontaktigis min al li, Ludoviko Pérez Óvilo, la plej elstara esperantisto de Murcia tiam. Tiel komencis rilato inter mi kaj geesperantistoj de Murcia.

Dekomence ni kunvenis lunde en ejo de Strato Sankta Teresa, en urbocentro, kiun poste ni perdis pro tio, ke oni forpuŝis de tie Ne Registarajn Organizojn por donaci la tutan konstruaĵon al UGT kaj CCOO. Poste ni parolis pri kelkaj projektoj, kiujn ni du deziris fari laŭ nia kreskanta amikeco. Unu el ili estis ***Esperanto España***, la retejo, kiu ankoraŭ ekzistas, eĉ se nur kreskas en ĝi ĉi tiu magazino kaj la ***Gazetoteko Lanti*** mem. Sed tie oni povas legi ankoraŭ kelkajn artikolojn de nia amiko Ludoviko.

Mi memoras, ke kiam mi diris al li, ke mi pensis redakti ĉi tiun magazinon, ***Kajeroj el la Sudo***, li konsilis al mi ne fari tion, ĉar tio estus granda problemo por mi kaj neniu dankus al mi se ĉio iras bone, kaj ĉiuj kulpus min se io ne iros bone. Ni ne konis ankoraŭ pri Jakvo Ŝram kaj iliaj banda-

Ludoviko atente klarigas



noj, sed liaj vortoj estis plenplenaj da saĝeco, kvankam eĉ mi sciante pri tio, mi elektis ne sekvi lian konsilon. Poste, kiam li vidis, ke mi jam publikigis kelkajn numerojn, li gratulis min kaj asertis, ke temas pri magazino *plena da digneco kaj oportuneco*. Tiuj vortoj valoras al mi multe pli ol tiuj aliaj malsaĝaj vortoj, fifamigoj kaj mensogoj de tiom da aliaj memdiritaj esperantistoj, kiuj scias nek debati nek kompreni pri tio, kio la interna ideo estas. Ludoviko Pérez Óvilo ja povus klarigi al ili pri tio same kiel katedrulo pri sia dumviva fako povus al tute analfabetaj uloj.

Iom post iom mi kompromitis kun Esperanto, kaj mi vojaĝis multe, kongresumis, publikigis diversajn aferojn kaj vizitis aliajn geamikojn, tiel ke nia rilato malproksimiĝis iusence, eĉ se ni vivis en la sama strato, ĉirkaŭ kelkaj centoj da metroj for unu el la alia. Sed fojfoje ni renkontis, hazarde, kaj ĝuis tason da kafo kune, kaj komentis aferojn pri politiko, vivo kaj Esperanto. Ĝis kiam, antaŭ ses jaroj, mi ekaŭdis, ke li havas kanceron.

Mi vizitis lin, kaj li diris al mi, ke oni ne povas operaciumi lin, sed, ke ĉio estas kontrolata. Dum tiuj jaroj mi vidis lin ne multe da fojoj, sed ni parolis pertelefone ofte. Mi memoras, la lastan fojon, antaŭ ses monatoj, kiam mi hazarde trovis lin en surstrata kafejo, kune kun sia edzino. Ni parolis pri religio, politiko, kaj Esperanto. Esperanto estis ĉiam sia dumviva intereso kaj emo. Li ade verkis artikolojn en lokaj ĵurnaloj pri Esperanto kaj pri la lingva problemo, kiun ĝi penas solvi. *Se oni ne adoptas Esperanton*, li kutimis diri, *tio ne estos malbona por Esperanto, sed por homoj, kiuj povus profiti sin per ĝi*. Li estis tre praktika homo, kiel tiu diraĵo sia verigas.

Kaj nun ni ne plu havas nian amikon Ludovikon. La 10-an de decembro mortis li, la saman tagon, kiam kroata aktorino Via Jerman ankaŭ forpasis. Se mi estus dikredanta homo, mi dirus, ke ili kune iris ĉielen, se estante tia, kia mi estas, mi nur povas diri, ke ili ambaŭ restas ĉe niaj koroj dum ni pensos pri ili kaj iliaj bonaj agoj. Tie ĉi ili ĉiam vivos.



## Parolas la prezidanto

Estimataj gehaelanoj:



Antaŭ kelkaj semajnoj mortis en Mursjo la mirinda esperantisto Jose Luis Pérez Óvilo, psikiatro kaj ĝisosta esperantisto.

Li vivas en nia koro, en la koro de nia grupeto, en la koro de ĉiu esperantisto, kiu konis lin.

inteligenta homo kaj honesta esperantisto. Kiam li mortis, io nia mortis kune.

En Hispanio ni nun ĝuas novan estraron, kiu diris, kiam ili estis en opozicio Ne pli impostojn.

Nun ili estas la estraro de Hispanio kaj diras "jes, pli da impostoj".

Jes pli da impostoj per financi la bankojn.

Jes pli da impostoj por financi la ŝparkasojn.

Jes malpli da impostoj por entrepenoj.

Rajoy mensogis. sed ni ne sciis se li mensogos. La ŝtato ne havas sufiĉe da mono, ĉar ĝi ne havas enspezojn sed Rajoy mensogas, ĉar la ŝtato havus sufice da mono, sufiĉe da enspezoj se li kontrolus la entreprenojn kaj provizistojn, kiuj ne pagas impostojn, ili estas la ne oficiala ekonomio.

Sed li ne volas kontroli ilin.

Se li ne volas kontroli li mensogas, kiam li diras, ke la ŝtato ne havas monon.

# Ni okupu nian movadon

Ian Fantom
2011-11-04

Ni ĉiuj scias, ke estas io malĝusta, sed ĝuste kion ni ne scias. Tiu estas koncizigo de ĝenerala sento kiu trairas tutajn populaciojn trans la mondo. La ekonomian krizon la homoj ne komprenas, sed ili ja komprenas, ke ili ne kaŭzis ĝin, sed ke ili tamen devas pagi por ĝi. Samtempe, dum la politikaj klasoj diras al ili, ke ili devos labori pli longe kaj ricevi malpli da kompenso ili vidas la financan eliton gajni neimageblajn riĉaĵojn.

La amasprotestoj de la movado *Okupu* ne plu temas nur pri financa krizo; ĝi temas pri la fundamenta demando, kiu regas la mondon. Temas pri korporacia regado anstataŭ demokratia regado. Temas pri tio, ke politikistoj ŝajnas esti en la manoj de gvidantoj de grandegaj financaj korporacioj, kiel la internaciaj bankoj, kiuj pruntedonas monon al registaroj kaj komence atendas ian voĉon en registara politiko. Se la registaroj ne estas akceptemaj al tio, la financaj institucioj povos pruntedoni al iliaj rivaloj. La rezulto de tio povas esti eterna enlanda konflikto, kaj eterna eksterlanda militado.

"Kion farus Jesuo?" demandas iuj el la okupantoj de la placo antaŭ la katedralo de Sankta Paŭlo kelkajn metrojn for de la londona borso. Tiu simpla demando kaŭzis skismon en la hierarkio de la katedralo, kiu jam rezultis en la eksiĝo de du el ties gvidantoj. Ĉu la katedralo forpelu la protestantojn per rimedoj de la juro kaj finfine perforta interveno de la polico, aŭ ĉu la katedralo bonvenigu la protestantojn, kiuj verŝajne faras ion tre similan al tio kion estus farinta Jesuo?

Intervenis la Ĉefepiskopo de Canterbury, ĝenerale konsiderata la ĉefepiskopo de la anglikana eklezio en Anglio. Li anoncis, ke li

subtenas imposton rilate al financaj transakcioj - iom stranga interveno, ĉar la rolo de la eklezio normale estas komenti pri moraleco, ne pri financaj teknikaĵoj. Por tiel argumenti, li diris, ke tion subtenas elstaraj riĉuloj kiaj Bill Gates kaj George Soros. Kion dirus Jesuo?

Mi supozus, ke Jesuo parolus pri la krima agado de riĉeguloj kiuj kaŭzis tiun financan krizon en la komenco. Ni devas alfronti la fakton, ke okazis grandskala krimo ĉe respektataj korporacioj, fare de respektindaj homoj en nigraj kompletoj kiuj nin trompis [1]. Sed estas malfacile al la anglikana eklezio alfronti tiun simplan fakton. La Katedralo de Sankta Paŭlo estas tro ligita kun financaj institucioj en Londono, kaj la membroj de la eklezio emas sekvi la ortodokson de la eklezio anstataŭ agi kiel bonaj kristanoj. La nun evoluanta skismo estas malbona por la eklezio, sed bona por la kristanismo.

La anglikana eklezio fondiĝis pro skismo en la romkatolika eklezio en Anglio, kiam la tirana reĝo Henriko la Oka volis transpreni la eklezion en sia regno por propraj politikaj celoj. Tiel la eklezio estis transprenita de la ŝtato. Ankaŭ aliaj movadoj havas similan problemon. British Council estis fondita per mono de la oleindustrio por antaŭenigi la anglan lingvon, kio evidente estis en la interesoj de la imperiismaj celoj de la monprovizantoj [2]. Mallonge poste intervenis la ŝtato per grandaj financaj subtenoj, kaj tiom transprenis la potencon, ke British Council fariĝis kvazaŭa branĉo de la registaro, dum samtempe ĝi pretendis esti sendependa organizaĵo, eĉ ricevante impostajn avantaĝojn kiel nepolitika registrita bonfara organizaĵo.

Amiko mia fondis 'Loĝigan Asocion' [Housing Association], por helpi al malavantaĝitoj havigi hejmon. Lia estis unu el la unuaj en la lando, sed iom pli poste intervenis la registaro per leĝoŝanĝoj kiuj malebligis al tiaj asocioj daŭrigi sian sendependan ekziston. La agadon transprenis la ŝtato, kiu instalis alte salajritajn burokratojn por ĉion regi. Mia amiko dediĉis unu jaron de sia vivo por tion kontraŭbatali anstataŭ daŭrigi sian normalan profesian vivon kiel juristo.

La sama amiko dum la Dua Mondmilito membris en politika partio 'Common Wealth Party'. Dum vizito al li antaŭ kelkaj semajnoj ni trairis

ĵurnalismajn verkojn kaj leterojn de George Orwell. Li montris al mi mencion de 'Common Wealth Party', kiu laŭ George Orwell estis malmuntita de la ŝtato.

Mi nur bedaŭris, ke en mia junaĝo mi ne pli studis la verkojn de George Orwell. Mi sentas min tre danka al unu el miaj instruistoj, ke li prezentis al ni la librojn '1984' kaj 'Bestoĝardeno', kiuj en la nuntempa mondo ŝajnas verkoj de historio verkitaj antaŭtempe. Sed la instruisto diris al ni, ke Orwell batalis kun Generalo Franco en la hispana enlanda milito. Jarojn pli poste, mi konstatis, ke 'batali kun' signifas 'batali kontraŭ'. Alie mi eble estus leginta iom pli, kaj fine kompreninta lian mesaĝon. Mi estus eble leginta, ke laŭ li la Laborpartio estas faŝisma organizaĵo, kaj mi estus pli facile kompreninta kiel la sama partio povus esti transprenita de eta kliko New Labour, kiu povus gvidi nin en plej terurajn militojn surbaze de mensogoj. Por kiu vere laboris Tony Blair? Mi ne scias, sed nun li maskeradas kiel Pac-Reprezentanto, gajnante mem financan imperion [3].

Tamen eĉ etaj organizaĵoj povas esti transprenitaj de la ŝtato. Dum la pasinta jaro estis malkaŝitaj intervenoj en diversaj tiaj organizaĵoj fare de la sekreta polico – jes, sekreta branĉo de la polica servo kiu entreprenas kontraŭleĝajn kaj politike motivigitajn agadojn. Tio pli frue estus por la britoj nepensebla, kaj ankoraŭ ni havas malfacilon enkapigi la seriozecon de tiu afero. Eĉ iu eta protestogrupo de virinoj vestitaj kiel klaŭnoj, nomanta sin 'La Ribela Klaŭn-Armeo' estis enfiltrita de kaŝa policanino.

La unua malmaskito estis policano Mark Kennedy, kiu rolis kiel Mark Stone en mediprotekta grupo, kaj kies agoj preskaŭ rezultis en la enkarcerigo de almenaŭ dudek senkulpaj kampanjantoj [4]. La esplorado pri tio rezultis en la malmasko de Lynn Watson (vera nomo nekonata), la policano vestita kiel klaŭno en Ribela Klaŭn-Armeo, eta grupo kiu protestis kontraŭ la irakan militon [5]. Aliaj kaŝaj policanoj malmaskitaj estis Bob Lambert, pozante kiel Bob Robinson [6], Mark (Marco) Jacobs, kies vera nomo estas nekonata [7], Peter Black [8] kaj Simon Wellings [9].

Grupoj infektitaj estis diversaj protestogrupoj, kiel anarkiistaj, bestorajtaj, kontraŭfaŝismaj, kontraŭtutmondiĝaj, kontraŭrasismaj, medioprotektaj kaj politike maldekstraj. Tiuj grupoj inkluzivis: 2008 Camp For Climate

Action [Tendumejo por Klimata Agado], manifestacio de 2008 kontraŭ la planita militserva akademio ĉe St Athan, Aldermaston Women's Peace Camp [Virina Pactendumejo ĉe Aldermaston], Animal Liberation Front [Besta Liberigofronto], anti-EDL [kontraŭ English Defence League], Cardiff Anarchist Network (CAN) [Anarkiista Reto de Cardiff], Cardiff Radical Socialist Forum [Radikala Socialista Forumo de Cardiff], Climate Camp [Klimata Tendumejo], The Common Place (Anarkiista centro en Leeds), Dissent! (la reto kiu mobilizis protestantojn por la pintokonferenco G8 ĉe Gleneagles), Globalise Resistance [Tutmondigu Resiston], London Greenpeace, No Border campaigns [kampanjojn kontraŭ landlimaj kontroloj] , Rebel Clown Army [Ribela Klaŭna Armeo], Reclaim the Streets [Reposedu la Stratojn], Rising Tide Network [Reto Leviĝanta Tajdo], kaj la rekt-agada reto Trident Ploughshares.

Tiuj kaŝaj britaj policanoj ofte simile aktivas ankaŭ en aliaj landoj. En la gazet-raportoj mi legis pri aktiveco en Francio, Germanio, Pollando, kaj planita aktiveco en Rusio, kiu estis lastmomente nuligita. La alternativa retgazeto Indymedia, kiu unue avertis pri la afero [10, 11] publikigis tekston por traduko en aliajn lingvojn, petante al legantoj kontribui al tio por averti aktivulojn diverslande [12].

La ekstremoj ĝis kiuj povis iri iuj el tiuj kaŝaj policanoj por gajni kredindecon en la grupoj kiujn ili enfiltris estas eksterordinaraj. Kennedy provokis kolegajn policanojn lin disbati ĉe iu Klimata Tendumejo. Jim Boyling mensogis sub ĵuro en krima proceso por protekti sian identecon. Bob Lambert aperis en kortumo sub fikcia nomo. Pluraj el ili havis seksajn rilatojn kun iuj el siaj viktimoj, kelkfoje longdaŭrajn rilatojn. Jim Boyling eĉ edzinigis unu el siaj viktimoj kaj havis du infanojn kun ŝi, kiuj nun aĝas 5 kaj 7 [13].

Sed kiel la homoj en tiuj grupoj reagas, kiam ili eltrovas, ke ili estis perfiditaj de homoj kiujn ili konis dum iom da tempo, kaj fidis? Alfronti la veron por tiuj homoj ne estas bagatelo; ili bezonas forton kaj kuraĝon por pritrakti ĝin. Ili bezonas ankaŭ moralan subtenon de siaj amikoj. Se la afero estas publikigata kaj raportata en la naciaj amaskomunikiloj povas esti forta sento de embarasiĝo, kiun ili volus eviti, sed almenaŭ ekde la

momento kiam la afero fariĝas publika ili estos kredataj. Nun provu imagi kiel estus por ili se ili daŭre estus malkredataj.

La Anarkiista Reto de Cardiff enretigis deklaron rilate al enfiltrado de la grupo fare de kaŝa agento de la polico [14]. Ili skribis: "Sed li [Marco Jacobs] ankaŭ intence kaj sisteme celis damaĝi la movadon, kaj ni opinias, ke estas grave, ke scio pri tio kion li faris, kaj kiel li faris, estu komunigita kaj diskutita laŭeble plej vaste". Ili skribis ankaŭ, ke multaj membroj skuiĝis pro kolero, indigniĝo kaj sinkulpigo. "Marco laboregis por dissemi malfidon, malŝaton kaj suspekton inter ni, kaj estis la fakto, ke ni permesis al li ke li tion faru, kiu estis nia plej granda eraro", ili skribis. Tiu agnosko ne perdigos por ili membrojn, aŭ fuŝigos iliajn rilatojn kun la publiko - tute male. Mi mem ekzemple sentas, ke jen homoj kun kiuj mi povus interese diskuti, eĉ se mi persone opinias, ke la anarkiismo kondukus al transpreno de la potenco fare de la fortuloj, kio rezultus ĝuste en korporacia ŝtato – sed eble mi ilin miskomprenas.

Iom simile, brita komediulo Mark Thomas skribis pri la propraj spertoj kaj reagoj kiam li trovis ke intima amiko lia spionis por la armila industrio pri lia agado kontraŭ la eksportadon de armiloj [15]. Grandskalan intervenon spertis la movado por la elektra aŭtomobilo en Kalifornio dum la naŭdekaj jaroj. La movadanoj ne kvietis pri la afero, sed kunlaboris kun filmkompanio, kiu produktis dokumentan filmon kun titolo 'Kiu mortigis la elektran aŭtomobilon?' [16]. En la filmo oni montris la fingron al la oleindustrio, CIA kaj George Bush. Nun la elektra aŭtomobilo havas pluan ŝancon, sed ĉu tio estus okazinta se iuj kuraĝuloj ne estus elparolintaj pri tio?

La tendenco turni sian dorson al tiaj intervenoj estas parto de la homa naturo. Homoj volas scii kaj ne scii samtempe. Mi havas en la menso foton de ĉimpanzo sur la kovrilo de iu popularscienca gazeto kiu evidentigis ĝuste la saman fenomenon: la ĉimpanzo tenis siajn manojn antaŭ la okuloj por obstakli la vidon, tamen lasis spacojn inter la fingroj tiel ke ĝi povu tamen vidi kio okazas. Ĝuste tiaj estas homoj.

Ne devus esti necese pruvi motivojn aŭ konspirojn; devus esti necese nur demonstri, ke homoj elektitaj por preni respondecon en iu socio aŭ societo ne agas laŭ la bonfido kiun la homoj investis en ili. Se okazas nedeca informkaŝado oni scias, ke estas io por kaŝi. Ne devus esti necese eltrovi kio estas tiu 'io', por ke oni elĵetu ilin el la ofico. Sed tre malvolonte la homoj tion faras, speciale se la elektitoj estas ĉarmuloj kiuj montras belan rideton kiam ili parolas publike.

En Universala Esperanto-Asocio estas ĝenerala sento, almenaŭ en la diskutgrupo uea-membroj, ke estas io malĝusta. Diskutoj ne kondukas ien. Eltrovi ĝuste kio okazas malantaŭ la bela faŝado estas kutime neeble. Ni ĉiuj scias, ke estas io malĝusta, sed ĝuste kio ni ne scias. Dum tuta jaro mi provis havigi simplan

respondon al la simpla demando "Kial?". Temis pri la decido de la Estraro en Kubo ĉesigi la kontrakton kun la redaktoro de la revuo Esperanto. Laŭ mia kompreno de la funkciado de iu ajn demokratia organizaĵo, se iu faras al komitato proponon li havas moralan devon klarigi kial li faras tiun proponon. La voĉdonantoj devas pripensi, ĉu tiu kialo validas. Se la proponanto evitas doni kialon, oni scias, ke estas io por kaŝi, kaj ke oni vere ne scias por kio oni voĉdonas. Bedaŭrinde, anstataŭ voĉdoni kontraŭ, Esperantistoj tro ofte dependas de la bonvolo de ĉiuj en la movado, kaj pasive aprobas ion ajn kion la moŝtuloj proponas, senkonsidere de la meritoj de la propono. Kaj post kiam la proponoj estas akceptitaj la membroj tro facilanime akceptas la decidojn. Laŭ mia percepto de demokratio, iu ajn Prezidanto kiu evitas la simplan demandon 'Kial?' devus esti forigita de sia ofico, kiom ajn bele kaj ĉarme li ridetas al ni.

Ĉe la pasinta Universala Kongreso en Kopenhago Johano Derks distribuis senpage al ĉiuj membroj de la Komitato de UEA sian libreton titolitan 'Gvidlibreto por Komitatanoj" [17], kaj provis vendi ĝin al aliaj ĉe la kongreso. La libreto enhavas detalan analizon pri la stagnado kiu sekvis proponon enkonduki perretan voĉdonadon por la Komitato, tiel ke la Komitato povu esti aktiva dum la jaro inter la kongresoj. La tuto povus esti resumita per unu vorto: 'obstaklado'. Dua parto havas pli ĝeneralajn analizojn de István Ertl, Martin Schäffer, Johano Derks kaj Renato Corsetti. Estas evidente, ke la asocio ne funkcias demokratie, kaj ke estas senutile fari decidojn se ili ne estos plenumitaj. Laŭ mi, devus esti konsekvencoj, sed la homoj tro malvolonte reagas al aferoj pri kiuj ili ne deziras scii, kaj tamen deziras scii, opiniiante, aŭ pretekstante, ke ili mem ne povas fari ion por ŝanĝi ion ajn.

En mia artikolo 'Lingva demokratio, ĉu?', kiu aperis en la aprila numero de Kajero el la Sudo [18], mi raportis pri neregulaĵoj en la mialanda Esperanto-movado. Estas malfacile al ordinara membro, aŭ al bonfida Esperantista nemembro enkapigi ĝuste kio okazas. La homoj volas vidi kaj ne volas vidi samtempe. Instinkte ili volas 'teni la aferon en la familio'. Ili volas kvieti pri la afero, kiel priskribis George Orwell, pri kio mi skribis en mia artikolo. Sed ni vidis per la supraj ekzemploj, ke tio ne estas la ĝusta maniero reagi. La membroj de diversaj grupoj havis la kuraĝon elparoli, kaj fine la publiko estis kun ili. Ankaŭ Esperantistoj devus fari same.

Unu problemo de tio estas la komplikeco de la informoj haveblaj. Malvolvi la tuton en mia landa movado ne estis bagatelo, kaj mi mem estis sub konstanta pafado dum mi tion faris. Preskaŭ la tuta Esperanto-movado en mia lando estis turnita kontraŭ min pere de personaj atakoj tuj post kiam mi eltrovis la veran staton de la kapitalo de la asocio, kiu estis la malo de tio kion la Estraro diris al la membroj. Sed eĉ se ĉio dirita pri mi estus la vero, tio ŝanĝus nenion rilate al la informoj kiujn mi trovis, kaj

kiujn iuj en la centro de la movado tenis kaŝaj al la membroj. Trakti kun la propra angoro, kiu similis al tio kion trairis Mark Thomas, estis en si mem defia tasko.

Sed nun unu grava aspekto de tiu disputo estas facile komprenebla. Ni havas finfine agnoskon de la kasisto de mia landa Esperanto-asocio, ke miaj ciferoj estas ĝustaj. Mi menciis en 'Lingva demokratio, ĉu?', ke mi fine sukcesis persvadi la redaktoron de periodaĵo de mia landa asocio publikigi mian financan grafikaĵon, kun akompana artikolo. Tiu artikolo nun estas legebla per Interreto [19], kiel ankaŭ la reago de la kasisto, kiu aperis en la posta numero [20]. La simpla fakto, ke la kasisto agnoskis, ke miaj ciferoj estas ĝustaj signifas, ke la kapitalo kreskis dum la tuta periodo de la 'financa krizo'. Ŝi devus nun esti devigata klarigi al la membroj kial laŭ la protokoloj ŝi informis la Estraron pri tute la malo: ke la kapitalo estas formanĝata. Ŝed ĉu ŝi tion faris? Ne! Intertempe ŝi 'emeritiĝis', kun donaco de bela horloĝo ĉe la jarkunveno kaj granda aplaŭdo. Samtempe estis aldonataj al la Estraro du pliaj raŭmistoj, kun nenia diskuto antaŭ la voĉdonado, malgraŭ miaj propraj streboj.

Anstataŭ ol klarigi la aferon, ŝi prezentis du grafikaĵojn por doni impreson, ke la kapitalo malkreskis dum ĝi fakte kreskis. Farante tion, ŝi demonstris ruzojn pri kiuj ĉiuj membroj de iu ajn membra asocio devus esti konsciaj. La unua leciono estas, ke oni devas legi la vortojn, kiom ajn da fido oni havas en la kasisto. Ŝia dua grafikaĵo, kiu montras falantan kapitalon por la periodo, estas prognozo de novembro 1994. Oni daŭre malakceptis miajn petojn prezenti pri la ciferoj eltrovitaj en decembro 2005, dirante, ke tio estas historio, sed nun ili prezentas antikvan historion. Kial prezenti prognozitajn ciferojn kiam oni havas la verajn, se la celo ne estas trompi la legantojn?


La alia grafikaĵo montras ĉiujarajn perdojn, kio ne povas esti la vera situacio se la kapitalo fakte kreskadis. Verŝajne tio rezultas el konfuzo kun 'deficito', kiu en tiu sistemo de kontado ŝajne ne inkluzivas donacojn. La landa asocio ĉiam dependis kaj de kotizoj kaj de donacoj. Eĉ la londona domo estis donaco. Pri tiu uzo de la vorto 'deficito' mi unue aŭdis antaŭ kelkaj jardekoj, kiam iu demandis, kiel eblas, ke ni ĉiujare faras deficiton kaj tamen neniam eluzas la monon. Tiam oni honeste respondis, ke 'deficito' ne inkuzivas donacojn. Supozu ke estas mil membroj en asocio en kiu ĉiu membro kotizas ĉiujare per dek eŭroj. Se la asocio elspezas la tuton, ne havigas ŝuldojn, kaj ne ricevas donacojn, la kontoj montros deficiton de nulo. Tamen se dum la jaro iu donacas mil eŭrojn kaj la asocio saĝe elspezas tion por la celoj de la asocio, la kontoj jarfine montros deficiton de mil eŭroj. Ekde tiu konstato en mia junaĝo mi ĉiam opiniis, ke la kontoj devus eksplicite registri la diferencon en la kapitalo en tiu momento kaj tiu de unu jaro antaŭe. Tamen mi

neniam supozis, ke iu uzus tiun misgvidan vorton 'deficito' por trompi la membrojn.

Do, la afero estas nun multe pli simpla por iu kiu deziras studi kiel funkcias tiaj aferoj. La kasisto informis la Estraron, ke la asocio formanĝas la kapitalon kaj samtempe obskurigis la kontojn, kaj neniu kontrolis. Aliaj Estraranoj kredis ŝin kaj kredigis al la membroj, ke la asocio daŭre perdas monon. Samtempe, la kasisto raportis pri kaduka stato de la domo, menciante grandan monsumon por fari ĉiujn riparojn. Sed mankis gravaj detaloj en la protokoloj. La tuta sumo elspezota estis £60 000, el kio "iom" estas "urĝa" – elspezota en la venontaj "kvin ĝis dek jaroj". Ili informis la membrojn, ke ili ricevis profesian konsilon, ke ili devos vendi la domon. Tamen neniun profesian konsilon mi povis trovi, krom mencio de la ĝenerala sekretario ke en iu kunveno la kontkontrolisto diris, ke ili devos vendi la domon. Nur tio – eĉ ne protokolitaj informoj pri ia komisio aŭ studo, kaj nenio por montri ke iu profesiulo estis pagita por fari tian studon. Cetere, la nivelo de kontkontrolado estis jam farita malpli severa, tiel ke ĝi ne plu nomiĝis laŭ la jura termino 'audit' [kontkontrolo]. Surbaze de tio la jarkunveno voĉdonis por vendi la domon.

Kial ili volus tion fari? Motivojn mi ne povas pruvi, sed kelkajn ni povas el praktika vidpunkto elimini, por ke ni povu studi la aliajn. La ebleco, ke iu povus lerni Esperanton, eniri la Estraron de la landa asocio, kun celo subfosi la movadon estas por la granda plimulto de la membroj nepensebla. Ili insistas, ke tio ne okazas, kaj ke iu ajn kiu eĉ pripensas tiun eblecon estas paranoja kaj havas konspirteoriojn. Iuj el ili tuj silentas kiam leviĝas demando pri la kapitalo aŭ la strangaj manovroj en la asocio. Aliaj blokas per la manoj dirante "A-a-a!". La redaktoro daŭre diris "Foriru!" antaŭ ol li fine devis akcepti mian artikolon kun financa grafikaĵo por publikigo en la gazeto. Mi estis edukita por respekti la racion, sed ŝajnas nun ke la racio elmodiĝis. Aŭ eble ĉiam estis tiel, sed ekster miaj rondoj, ĉar George Orwell siatempe skribis pri similaj reagoj kiam homoj provas diri ion kio ne konformiĝas kun la ortodokso.

Sed nun la tuta afero pri tiu kapitalo estas legebla en Esperanto per la reto, kaj kun escepto de la evidente intencaj obskurigoj de la kasisto, la afero estas esence simpla. La membroj ĉiuj scias, ke estas io malĝusta, sed ĝuste kio ili ne scias. Sed nun iuj el ni ja scias. La Prezidanto tenas kvieta unu el la plej abomenindaj skandaloj en la historio de la Esperanto-movado, kaj la veraj Esperantistoj restas kvietaj. Tamen nun ni havas multajn ekzemplojn de membrogrupoj kiuj estis enfiltritaj kun la celo subfosi la grupojn en nedemokratia maniero. La aktivaj Esperantistoj kiujn mi renkontis antaŭ kvindek jaroj ne estus tiom tolerintaj iujn el



## Don José Luis Pérez Ovilo

Médico

†

falleció en Murcia el día de ayer, a los 63 años de edad, habiendo recibido los santos sacramentos y la bendición apostólica de Su Santidad.

**D. E. P.**

Sus afligidos: esposa, Nuria Pérez-Romero Martínez; hijas, Nuria y Patricia; hijos políticos, Carlos y José Mario; nieto, Carlos; hermanas, María Pilar y María Luisa; hermanos políticos, sobrinos, primos y demás familia ruegan una oración por su alma y su asistencia a la misa corpore insepulto que tendrá lugar hoy lunes, a las 10'45 HORAS, en la capilla del Tanatorio de Jesús, de Espinardo, por cuyo señalado favor les anticipan su agradecimiento.

Murcia, 12 de diciembre de 2011

**Tanatorio de Jesús. Sala 4 FUNERARIA SATURNINO**

la pli ekstremaj aferoj kiuj nuntempe okazas en la movado. Sed ŝanĝiĝis la kulturo. Anstataŭ esti en la avangardo, la Esperantistoj bedaŭrinde postlamas tiun pli vastan evoluiĝantan movadon por demokratio.


Mi ne scias, kiu estas malantaŭ tiu subfosa agado en la Esperanto-movado; povus esti La Esperanta Civito, aŭ la sekreta polico, aŭ la sekurecservoj, aŭ povus esti la korporacioj. Povus esti ekzemple la oleindustrio kiu subvenciis la starigon de British Council, kaj kiu ŝajne mortigis la elektran aŭtomobilon. Sed se Esperantistoj absolute asertas, ke tio ne okazas en la Esperantomovado, la homoj finfine komencos demandi: "Kial ne? Kio estas pri la Esperanto-movado kiu faras ĝin imuna? Kio estas malbona pri Esperanto, ke tio ne okazu?".

Mi ĵus ekvidis interretan videon de la movado Okupu kun Esperantaj subtitoloj [21]. Ĝi montras la hipokritecon de iuj el la okcidentaj politikaj gvidantoj. Similajn homojn ni havas ankaŭ en la Esperanto-movado. Ili havas duoblajn personecojn, sed la ĝenerala membraro vidas nur la publikan personecon. Homoj aparte sukcesaj aŭ aparte sciohavaj povas esti silentigataj multmaniere. Unu el tiuj manieroj estas flatado. La iama ĝenerala sekretario kiu ŝokiĝis vidi mian financan grafikaĵon en januaro 2011, dirante ke li priesploros la aferon, nun kvietas. Lia tasko devus nun esti facila, ĉar la kasisto agnoskis, ke miaj ciferoj estas ĝustaj. Sed neniun vorton mi aŭdis post kiam la asocio honorigis lin per fratuleco. Mi mem redonis mian fratulecan atestilon en 2004 kiam mi ekkonstatis kio okazas. La iama kunordiganto de la Parlamenta Esperanto-Grupo, kiu estis la celo de misfamiga kampanjo en 1999, kiam la parlamenta grupo kolapsis kaj li mem malaperis de la movado por ses jaroj, nun estas dungita de la asocio kiel kunordiganto pri informado, kaj ŝajne nun li amas Grandan Fraton. Se li vere bone sukcesos pri la informado oni certe faros al li kion ili faris al li en 1999, aŭ ili faros al li kion ili faris al mi kiam mi estis en simila ofico en 2003. Por flati la redaktoron kiu konstante diris al mi, ke mi foriru, ili subtenis la eldonon de ampleksa literatura kompilaĵo lia. Kiel oni povas eĉ penseti, ke tiaj helpemaj kaj ĉarmaj homoj povus esti io alia ol bonfidaj? Necesas distancigi sin. Oni tutsimple pripensu la bankistojn kaj rigardu la ciferojn.

Ni ĉiuj scias, ke estas io malĝusta, sed nun ke ni havas konkretajn pruvojn, ni okupu nian movadon.

1. 'Inside Job', filmo, Sony, 2010 (http://sonyclassics.com/insidejob)
2. 'Linguistic Imperialism', Robert Phillipson, Oxford University Press, 1992, ISBN 0 19 437146 8, 365 paĝoj:
3. Dispatches, televidprogramero, Channel 4, 2011-10-27

(http://www.channel4.com/programmes/dispatches/episode-guide/series-102/episode-1).
4. http://www.guardian.co.uk/uk/2011/jan/09/undercover-office-green-activists
5. http://www.guardian.co.uk/uk/2011/jan/25/police-spy-lynn-watson-clown
6. http://www.guardian.co.uk/uk/2011/oct/23/police-spy-tricked-lover-activist
7. http://www.guardian.co.uk/uk/2011/jan/19/undercover-police-officer-mark-jacobs
8. http://www.guardian.co.uk/uk/2011/oct/26/police-spy-urges-public-inquiry
9. http://www.bbc.co.uk/news/uk-12867187
10. http://sheffield.indymedia.co.uk/2011/01/472314.html
11. http://www.indymedia.org.uk/en/2011/01/472102.html
12. http://www.indymedia.org.uk/en/2011/01/472162.html
13. http://www.thisislondon.co.uk/standard/article-23915950-officer-in-second-undercover-case-wed-activist-he-was-sent-to-spy-on.do
14. http://www.permanentrevolution.net/entry/3251
15. http://www.guardian.co.uk/world/2007/dec/04/bae.armstrade




16. 'Who killed the electric car?', filmo, Sony, 2006 (http://whokilledtheelectriccar.com
http://topdocumentaryfilms.com/who-killed-the-electric-car)
17. 'Gvidlibreto por Komitatanoj: Fidoperduloj pri perfiduloj: demokratuloj pri komitatlista mistifikado kaj kiel Estraro sub revulo misdirektas monon, sed tamen venonta sento pri UEA 2.0', Johano Derks, 2011. Eldonis la aŭtoro (Haveblas kontraŭ 4.8 eŭroj de la aŭtoro: retadreso: derks.esp ĉe tiscali.nl)
18. [ref] 'Lingva demokratio, ĉu?', Ian Fantom, Kajero el la Sudo, 85, aprilo 2011, paĝoj 7-11
19. http://esperanto-gb.org/eab/eab_update/gxisdate53.pdf pp12-13
20. http://esperanto-gb.org/eab/eab_update/gxisdate54.pdf p19
21. 'MI NE FORIRAS - Filmeto - Okupu Wall Street', video, 2011 (http://www.universalsubtitles.org/en/videos/UWvmo0m6gqNZ/eo/179258/)

[ref] Lingva demokratio, ĉu?', Ian Fantom, Kajeroj el la Sudo, 85, aprilo 2011, paĝoj 7-11
[ref] Who killed the electric car?, Sony, 2006 (http://whokilledtheelectriccar.com http://topdocumentaryfilms.com/who-killed-the-electric-car)
[ref] Inside Job, Sony, 2010 (http://sonyclassics.com/insidejob)
[ref: Derks: 'Gvidlibreto por Komitatanoj: Fidoperduloj pri perfiduloj: demokratuloj pri komitatlista mistifikado kaj kiel Estraro sub revulo misdirektas monon, sed tamen venonta sento pri UEA 2.0', Johano Derks, 2011. Eldonis la aŭtoro (4.8 eŭroj).

# La faraono

## Ĉapitro 34.

La sekvintan tagon la princo leviĝis malfrue, kantis, lavis sin kaj alvokis Tutmozison.

Feste vestita kaj parfumita la elegantulo tuj venis, atente rigardante la prncon por ekkoni, kian humuron li havas, kaj konformiĝi al ĝi sian fizionomion.

Sed sur la vizaĝo de Ramses oni povis legi nur lacecon.

—Do, demandis li Tutmozison, oscedante, —ĉu vi estas certa, ke naskiĝis al mi filo?

—Mi aŭdis la novaĵon de la sankta Mefres.

—Ho, ho! De kiam la profetoj sin okupas pri mia domo?

—De l' tempo, kiam via ekscelenco montras al ili sian favoron.

—Jes?—, demandis la prnco kaj ekmeditis.

Li rememoris la hieraŭan scenon en la templo de Astarte kaj komparis ĝin kun analogiaj fenomenoj en la templo de Hator.

—Oni vokis min—, diris li al si, —tie ĉi kaj tie. Sed tie mia ĉelo estis malvasta kaj havis dikajn murojn: ĉi tie la vokanto, aŭ pli ĝuste Kama, povis sin kaŝi post kolono kaj murmureti... Fine ĉi tie estis terure mallume, kaj en mia ĉelo estis lume...

Subite li diris al Tutmozis:

—Kiam tio okazis?

—Kiam naskiĝis via nobla filo? Jam antaŭ dek tagoj, oni diras... La patrino kaj infano fartas bone, havas bonegan aspekton. Ĉe la akuŝo estis Menes mem, al kuracisto de via respektinda patrino kaj de Herhor.

—Bone, bone—, respondis la princo kaj ree pensis: ONi tuŝis min tie kaj ĉi tie, same lerte. Ĉu estis ia diferenco? Ŝajnas, ke estis, eble tial, ke ĉi tie mi estis preparita vidi miraklon, kaj tie ne. Sed ĉi tie oni montris al mi alian "min", kion oni ne sciis fari tie. Tre saĝaj estas la pastroj! Mi dezirus scii, kiu tiel bone mi ŝajnigis: dio aŭ homo? Ho, la pastroj estas tre saĝaj, kaj mi eĉ ne scias, al kiuj prefere kredi: al tiuj niaj aŭ al la feniciaj?"

—Aŭskultu, Tutmozis—, diris li laŭte—, aŭskultu Tutmozis... Ili devas veni ĉi tien. Mi ja devas vidi mian filon. Fine neniu havos plu la rajton sin opinii pli alta ol mi.

—Ĉu tuj devas alveturi la respektinda Sara kun la filo?

—Plej rapide, se nur la sano permesas al ili. En la limoj de la palaco estas

multe da komfortaj konstruaĵoj. Oni devas elekti inter la arboj lokon, senbruan kaj malvarmetan, ĉar proksimiĝas la tempo de la varmegoj. Mi ankaŭ povu montri al la mondo mian filon!

Kaj li ree profundiĝis en medito, kio eĉ komencis maltrankviligi Tutmozison.

«Jes, ili estas saĝaj—, pensis Ramzes. —Ke ili trompas la popolon eĉ per malspritaj rimedoj, pri tio mi sciis. La kompatinda santkta Apis! Kiom da pikoj li ricevas dum la procesio, kiam la kamparanoj kuŝas antaŭ li sur la ventroj. SEd ke ili trompas min, al tio mi ne kredus. La voĉoj de dioj, nevideblaj manoj, homo martirata per bolanta peĉo, tio estis nur antaŭludoj! Poste venis la kanto de Pentuer: pri la malgrandiĝo de la loĝantaro kaj teritorio, pri la oficistoj, fenicianoj, kaj ĉio por fari al mi la militon abomena»

—Tutmozis—, diris li subite.

—Mi falas antaŭ vi surla vizaĝon...

—Oni devas malrapide kolekti la regimentojn de l a apudmaraj urboj ĉi tien. Mi volas fari revuon kaj rekompenci ilian fidelecon.

—Kaj ni, la nobeluloj, ĉu ni ne estas al vi fidelaj?, demandis la konfuzita Tutmozis.

—La nobeluloj kaj la armeo estas la sama unu.

—Kaj la nomarĥoj, oficistoj..?

—Vi scias bone, Tutmozis, ke eĉ la oficistoj estas fidelaj, daŭrugis la princo... Kion mi diras, eĉ fenicianoj! Sed sur multaj aliaj postenoj estas perfiduloj.

—Pro dioj, malpli laŭte!,murmuretis Tutmozis, time rigardante en la alian ĉambron.

—Ho, ho!—, ridis la princo, —de kie venas ĉi tiu teruro? Do ankaŭ por vi ne estas sekreto, ke ni havas perfidulojn.

—Mi scias, pri kiu vi parolas, Respondis Tutmozis, —ĉar vi ĉiam suspektis...

—Kiun?

—Kiun? Mi divenas. Sed mi supozis, ke post la paciĝo kun Herhor, post longa estado en la templo...

—La templo? Tie, same kiel en la tuta lando mi konvinkiĝis, ke la plej bona tero, la plej brava loĝantaro kaj sennombraj riĉaĵoj ne estas la propraĵo de l' Faraono.

—Pli mallaŭte!, pli mallaŭte!, murmuretis Tutmozis.

—Mi ja ĉiam silentas, ĉiam mi havas serenan vizaĝon, permesu do al mi satparoli hodiaŭ. Cetere eĉ antaŭ la plej alta konsilantaro mi havus la rajton diri, ke en ĉi tiu Egipto, kiu sendivide apartenas al mia patro, ni, la kronprinco kaj vic-reĝo devis prunti cent talentojn de ia tira princeto. Ĉu tio ne estas honto!

—De kie venis al vi hodiaŭ tiaj pensoj?—, demandis Tutmozis, dezirante plej baldaŭ fini la danĝeran interparoladon.

—De kie?, ripetis la princo kaj eksilentis. Ree li profundiĝis en medito.

«Ne estus ankoraŭ grave», pensis li, «se ili trompadus nur min: mi estas nur la kronprinco kaj ne ĉiujn sekretojn oni povas konfidi al mi. Sed kiu konvinkos min, ke ili ne agis same kun mia respektinda patro? Tridek tri jarojn li konfidis al ili senlime, humiliĝis antaŭ la mirakloj, malavare oferis al la dioj, por..., ke liaj riĉaĵo kaj povo transiru en la manojn de ambiciaj friponoj! Kaj neniu malfermis al li la okulojn. Ĉar la faraono ne povas, kiel mi, eniri nokte en la fenicajn templojn, ĉar fine neniu estas allasata al lia sankteco.

«Kaj kiu garantios al mi hodiaŭ, ke la pastraro ne celas al la renverso de la trono, kiel diris Hiram? Mia patro ja avertis min, ke fenicianoj estas plej verdiraj kiam tion bezonas iliaj aferoj. Certe, estas por ili grava afero, ke oni ne elpelu ilin el Egipto kaj ne transdonu en la manojn de Asirio. Asirio, aro de rabiaj leonoj! Kie ili pasas, restas nenio, nur ruinoj kaj kadavroj, kvazaŭ post brulo!

Subite Ramzes levis la kapon< de malproksime alflugis sonoj de flutoj kaj kornoj.

—Kion tio signifas?—, demandis li Tutmozison.

—Granda novaĵo!—, respondos la kortegano kun rideto. —Azianoj salutas faman pilgrimon, venantan el Babilono.

El Babilono? Kiu li estas?

—La nomo estas Sargon.

—Sargon?—, interrompis la princo. —Sargon! Ha, ha, ha!—, komencis li ridi. —Kiu li estas?

—Oni diras, ke li estas altrangulo de la kortego de Assar. Li kondukas kun si dek elefantojn, arojn da belegaj ĉevaloj de dezerto ,amasojn da sklavoj kaj servistoj.

—Kaj por kio li venis?

—Saluti la miraklan diinon Astoret, kiun respektas la tuta Azio—, respondis Tutmozis.

—Ha, ha, ha!—, ridis la princo, rememorante la antaŭdiron de Hiram pri la asiria sendito. —Sargon..., ha, ha, ha! Sargon, la parenco de la reĝo Assar fariĝis subite tiel pia, ke li

entreprenas longan,lacigan vojaĝon nur por honori la diinon Astoret en Pi/Bast. En Ninivo li ja trovus pi grandajn diojn kaj pli klerajn pastrojn.... Ha,ha, ha!

Tutmozis mire rigardis la princon.

—Kio estas al vi, Ramses?

—Jen miraklo!—, diris la princo. —Kian kredeble enskribis kroniko de neniu templo. Pensu nur, Tutmozis. En la momento, en kiu vi meditas pri la demando, kiel kapti friponon, kiu senĉese ŝtelas vin, en la sama momento la ŝtelisto ree metas la manon en vian keston, antaŭ viaj okuloj, antaŭ mil atestantoj... Sargon, pia pilgrimo! Ha, ha, ha!

—Mi komprenas nenion...—, murmuretis la konsternita Tutmozis.

—Kaj vi ne bezonas kompreni—, respondis la vic-reĝo. —Memoru nur, ke Sargon venis ĉi tien por piaj aferoj, en la templon de la diino Astoret.

—Ŝajnas al mi, ke ĉio, pri kio vi parolas—, diris, mallaŭtigante la voĉon, Tutmozis, —ke ĉio estas danĝeraj aferoj...

—Kaj tial vi ripetu ilin al neniu.

—Ke mi ne ripetos ilin, pri tio vi sendube estas certa, sed ĉu vi mem, princo, ne perfidos vin.... Vi estas rapida, kiel la fulmo.

La kronprinco metis la manon sur lian ŝultron.

—Estu trankvila—, diris li rigardante liajn okulojn. —Se nur vi estos fidelaj al mi, vi, la nobeluloj kaj armeo, vi vidos strangajn okazojn, kaj finiĝos por vi la malfacilaj tempoj!

—Vi scias, ke ni estas pretaj perei je via ordono—. respondis Tutmozis, metante la manon sur la brusto.

Sur lia vizaĝo estis tiel neordinara seriozeco, ke la princo komprenis, cetere ne unuafoje, ke en ĉi tiu diboĉanta elegantulo sin kaŝas brava vivo, al kies glavo kaj prudento oni povas fidi.

De tiu tempo la princo neniam plu parolis kun Tutmozis tiel strange, sed la fidela amiko kaj servisto divenis, ke post alveno de Sargon sin kaŝas iaj grandaj kaj ŝtataj aferoj, arbitre decidataj de la pastroj.

Cetere de iom da tempo, la tuta egipta aristokrataro, nomarĥoj, superaj oficistoj kaj armeaj ĉefoj, tre, tre mallaŭte murmuretis inter si, ke proksimiĝas gravaj okazoj. Fenicianoj, postulante ĵuron pri diskreteco, rakontis al ili pri iaj traktatoj kun Asirio, kiuj pereigos Fenicion kaj Egipton kovros per malhonoro kiu scias, eble la tero de l' faraonoj fariĝos tributanto de Asirio.

La ekscito de la aristokrataro estis grandega, sed neniu sin perfidis. Kontraŭe, en la kortego de la kronprinco, same kiel ĉe la nomarĥoj de Malsupra Egipto oni amuziĝis bonete. Oni povis pensi, ke kun la varmego falis sur ilin frenezo de l' amuzoj kaj diboĉoj. Pasis neniu tago sen ludoj, festenoj, trimfaj procesioj, neniu nokto sen iluminoj kaj krioj. Ne sole en Pi-Bast, sed en ĉiu urbo naskiĝis

modo trakuri la stratojn kun torĉoj, muziko kaj ankaŭ ĉio kun plenaj kruĉoj. Oni invadis domojn kaj eltiris la dormantajn loĝantojn al drinkado. Ĉar egiptanoj havis grandan inklinon al diboĉoj, ĉiuj, kiu ajn vivis, amuziĝis.

Dum la tuta ĉeesto de Ramzes en la templo de Hator, fenicianoj, kvazaŭ kaptitaj de panika timo, pasigis la tagojn preĝante kaj rifuzis la kredito al ĉiuj. Sed post la interparolado de Hiram kun la vic-reĝo la pieco kaj singardeo subite forlasis fenicianojn; kaj ili komencis pruntedoni al la egiptaj sinjoroj pli malavare, ol iam ajn.

La plej aĝaj homoj ne memoris iam en Malsupra Egipto tian amason da komercaĵoj kaj oro kaj precipe tiel malgrandajn procentojn.

La severa kaj saĝa pastraro turnis sian atenton al la frenezo de la plej altaj sociaj klasoj. Sed ili eraris pri la fontoj, kaj la sankta Mentezufis, kiu ĉiun kelkon da tagoj sendis matene raporton al Herhor, ĉiam ripetis, ke la kronprinco, laca de la piaj okupoj en la templo de Hator, nun amuziĝas kiel frenezulo, kaj kun li la tuta aristokrataro. La glora ministro eĉ ne respondis la leterojn, kio pruvis, ke li rigardis la diboĉojn de la princo, kiel ion tute naturan, eble eĉ utilan.

En tiu stato de l' spiritoj de la kortego, Ramzes gajnis multe da libero. Preskaŭ ĉiuvespere, kiam la ebriaj de l' vino konrteganoj komencis perdi la konscion, la princo elglitis el la palaco.

Kovrita per nigra oficira burnuso, li trakuris la malplenajn stratojn kaj eliĝis ekster la urbon, al la ĝardenoj de la templo de Astoret.

Tie li retrovis sian benkon kontraŭ la palaceto de Kama, kaj kaŝita inter la arboj, li rigardis la brulantajn torĉojn, aŭskultis la kantojn de la amantoj de la pastrino kaj revis pri ŝi.

La luno leviĝis pli kaj pli malfrue, proksimiĝante al la nova luno, la noktoj estis grizaj, la lumaj fenomenoj malaperis, sed Ramzes malgraŭ tio ĉiam vidis la helecon de la unua nokto kaj aŭdis la pasiajn strofojn de la greko.

Ofte li leviĝis de la benko por iri rekte en la loĝejon de Kama, sed la honto haltigis lin. Li sentis, ke ne konvenas al la kronprinco sin montri en ia domo de la pastrino, kiun vizitis ĉiu pilgrimo, kiu donis pli malavaran oferon al la templo. Sed estis io pli stranga: li timis, ke la vido de Kama, ĉirkaŭita de kruĉoj kaj malsukcesaj adorantoj, malklarigos al li la pentraĵon miraklan de la luna nokto.

Tiam, kiam ŝin sendis Dagon por farigi la koleron de la princo, Kama ŝajnis al Ramzes juna knabino, alloga, sed por kiu oni ne povis perdi la kapon. Sed kiam unuan fojon en la vivo, li, la estro kaj vic-reĝo devis atendi apud la domo de virino, kiam la nokto igis lin revi, kiam li aŭdis varmegan aman konfeson de alia viro, tiam, ankaŭ la unuan fojon en lia vivo, naskiĝis en li stranga sento: miksaĵo de deziro, sopiro kaj ĵaluzo.

Sed li povus havi Kaman post ĉiu alvoko, ŝi baldaŭ tedus lin, li eĉ eble ŝin ne serĉus. Sed la morto, staranta ĉe la sojlo de ŝia dormo-ĉambro, la kantisto adoranto, kaj fine la humiliĝo de plej alta ŝtata ĉefo antaŭ pastrino, ĉio ĉi kreis al Ramzes situacion ĝis nun nekonatan, allogan.

Jen kial de dek tagoj, preskaŭ ĉiuvespere, li venis en la ĝardenojn de la diino Astoret, kaŝante de la pasantoj la vizaĝon.

Foje vespere, trinkinte multe da vino dum la festeno en sia palaco, Ramzes elglitis kun firma decido. Li diris al si, ke hodiaŭ li eniros en la loĝejon de Kama, kaj ŝiaj adorantoj kantu sub ŝiaj fenestroj.

Li paŝis rapide tra la urbo, sed en la ĝardenoj apartenantaj al la templo li malrapidigis la paŝojn, ĉar ree li eksentis honton.

—Ĉu oni iam aŭdis—, pensis li, —pri faraona kronprinco, kiu kuras post la virinoj, kiel mizera skribisto, kiu povas nenie prunti dek draĥmojn? Ĉiuj venadis al mi, do ankaŭ ĉi tiu pastrino devas veni...

Kaj jam li volis reveni.

—Tamen ŝi ne povas veni—, diris li en sia animo, —ĉar oni mortigus ŝin...

Li haltis kaj ŝanceliĝis.

—Kiu mortigus ŝin? Hiram, kiu kredas je nenion, aŭ Dagon, kiu mem ne scias plu, kiu li estas? Jes: sed estas ĉi tie multaj aliaj fenicianoj, trapasas centojn da miloj da pilgrimoj fanatikaj kaj sovaĝaj. En la okuloj de ĉi tiu malsaĝuloj, Kama, vizitante min, farus malpiaĵon...

Li ree sin direktis al la palaceto de la pastrino. Li tute ne pensis, ke al li povas minaci tie danĝero. Al li, kiu ne eltirante la glavon per la sola rigardo povas faligi al siaj piedoj la tutan mondon. Li, Ramzes, kaj la danĝero!

Kiam la princo eltiris el inter la arboj, li rimarkis, ke la domo de la pastrino estas pli hele lumigita kaj pli brua, ol ordinare. Efektive, la ĉambroj kaj la terasoj estis plenaj da gastoj, ĉirkaŭ la palaceto svarmas amasoj.

«Kia bando?», pensis la princo.

Tie ne estis ĉiutaga kunveno. Ne malproksime de la domo staris grandega elefanto, kies dorso estis ŝarĝita per ora portilo kun purpuraj kurtenoj. Apud la elefanto malpacience blekis dekkelko da ĉevaloj kun dikaj koloj kaj kruroj, kun vostoj ligitaj malsupre, kaj portantaj sur la kapoj kvazaŭ metalajn kaskojn.

Inter la bestoj maltrankvilaj kaj preskaŭ sovaĝaj iris kaj revenis kelkdeko da homoj, kiujn Ramzes vidis neniam antaŭe. Unuj portis longajn vestojn el maldelikata drapo, longajn barbojn, pintajn ĉapojn kun kufoj sur la oreloj; aliaj mallongajn surtutojn kaj pantalonojn, kelkaj botojn kun tibiingoj. Ĉiuj estis armitaj per glavoj, arkoj kaj lancoj.

Vidante ĉi tiujn fremdulojn, fortajn, malgraciajn, vulgare ridantajn,

odorantajn sebon kaj parolantajn nekonatan kaj malmolan  lingvon, Ramzes ekbolis. Kiel leono, kiam li ekvidas fremdan beston, eĉ se li ne estas malsata, prepariĝas al salto, same Ramzes, kvankam ĉi tiuj homoj ne estis kulpaj kontraŭ li, eksentis teruran malamon. Incitis lin ilia lingvo, vestoj, odoro, eĉ iliaj ĉevaloj. La sango alfluis al lia kapo. Li etendis la manon al la glavo por sin ĵeti sur ĉi tiujn homojn, mortigi ilin kaj iliajn bestojn. Sed li rekonsciiĝis.

«Set ĵetis  sorĉon sur min!», pensis li.

En la sama momento pasis preter li nuda egiptano ku nkufo sur la kapo lak zono ĉirkaŭ la koksoj. La princo sentis, ke ĉi tiu homo estas agrabla, eĉ kara por li en tiu ĉi momento, ĉar li stas egiptano. li prenis el la sako rinkon, valorantan dekkelkon da draĥmo kaj donis ĝin al la sklavo.

—Aŭskultu—, demandis li, —kiu ili estas?

—Asirianoj—, murmuertis la egiptano kaj malamo ekbrilis en liaj okuloj.

—Asirianoj!—, ripetis la princo. —Ili do estas asirianoj? Sed kio nili faras ĉi tie?

—Ilia, sinjoro, Sargon, amindumas la pastrinon, la sanktan Kaman. Kaj ili gardas lin... La lepro manĝu iiln, porkajn filojn!

—Vi povas foriri.

La nuda homoprofunde sin klinis antaŭ Ramzes kaj ekkuris, kredeble en la kuirejon.

«Tio do, estas asirianoj?—, pensis la princ, rigardante la strangajn figurojn ka jaŭskultante la malamatan, kvankam nekmpreneblan  lingvon. —Do asirianoj jam estas apud Nilo, por fratiĝi kun ni, aŭ trompi nin, kaj ilia ĉefo amindumas Kaman?

Li reiris hejmen. Lia revado estingiĝis ĉe la brilo de nove, kvankam apenaŭ vekiĝanta pasio. li, homo nobla kaj dolĉa, sentis mortan malamon al la eterna malamikoj de Egipto, kiujn li renkontis la unuan fojon.

Kiam antaŭe, forlasinte la templon de Hator kaj post la interparolado kun Hiram, li komencis mediti pri la milito kontraŭ Azio, tio estis nur meditoj. Egipto bezonis homojn kaj la faraono trezorojn: ;la  milito estis la plej facila rimedo akiri ilin, ĝi povis satigi lian bezonon de la gloro, li do projektis militon.

Sed en la nuna momento estis indiferentaj por li la trezoroj, sklavoj kaj gloro ,ĉar vekiĝis en li la voĉo de la malamo, pli potenca ol ĉio. La faraonoj tiel longe batalis kontraŭ asirianoj, ambaŭ kontraŭuloj verŝis tiom da sango, la malamo havis tiel profundajn radikojn en al koroj, ke la princio ĉe la sola vido de la asiriaj soldatoj kaptis la glavon. Ŝajnis, ke ĉiuj spiritoj de la mortintaj batalantoj, ĉiuj iliaj penoj kaj doloroj reviviĝis en la animo de la reĝa infano

kaj alvokis venĝon.

Kiam la princo revenis en la palacon, li ordonis alkonduki Tutmozison. El la du amikoj, unu estis ebria, la alia furioza.

—Ĉu vi scias, kiun mi vidis nun?—, diris la princo al la favorato.

—Eble unu el la pastroj...—, murmuretis Tutmozis.

—Mi vidis asirianojn—, interrompis la princo. —Ho, dioj!, kion mi eksentis. Kia malnobla popolo. Ilia korpo de la piedoj ĝis la kapo estas ĉirkaŭvolvita per lano, kvazaŭ ĉe la sovaĝaj bestoj, ili malbonodoras putran sebon, kaj kia lingvo, kiaj barboj, haroj!

Li paŝis rapide en la ĉambro, malfacile spirante, ekscitita.

—Mi pensis—, diris Ramzes, — ke mi malscias la ŝtelojn de la skribistoj, la trompojn e la nomarĥoj, ke mi malamas la ruzajn kaj ambiciajn pastrojn... Mi sentis abomenon al hebreroj kaj mi timis fenicianojn. Sed hodiaŭ mi konvikiĝis, ke tio estis nur ludoj. Nur hodiaŭ mi ekscias, kio estas malamo, kiam mi ekvidis kaj ekaŭdis asirianojn; nun mi knmprenas, kial la hundo disŝiras la katon, kiu trakuris lian vojon...

—Al hebreoj kaj fenicianoj vi kutimis, via ekscelenco, asirianojn vi renkontis la unuan fojon—, interrompis Tutmozis.

Bagatelo fenicianoj!, daŭrigis la princo kvazaŭ al si mem. Feniciano, filistino, saŝu, libiano, eĉ etiopiano, estas kvazaŭ membroj de nia familio. Kiam ili ne pagas tributojn, ni koleras kontraŭ ili, kiam ili pagis, ni forgesas...

Sed asiriano estas io fremda, tiel malamika, ke... MI ne estos feliĉa antaŭ kiam mi ne estos kalkulinta almenaŭ cent mil detranĉitajn manojn!

Tutmozis neniam vidis Ramzeson en tia stato de l' animo.



# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetotekolanti.com/hale/k87.pdf

## Enhavo

**Redaktore............................2**
**Parolas la Prezidanto........4**
**Ni okupu nian movadon...5**
**La Faraono, ĉ34ª............16**

**Prezidas: Johano A. Cabezos.**

**Redaktas: Jesuo de las Heras.**

**Korektas: Jozefo Pina.**

**Retskribu al: kajeroj@gmail.com**

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoro, ne la redakcio.
Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo ne mistraktu personon.

Nova konto La Caixa: 2100 4617 41 2200115275

**Kovrilo:** Lastan decembron forpasis nia kara altestimato Jozefo Ludoviko Pérez Óvilo, post longa kaj dolora malsano.
Ni ĉiam memoros pri li kaj pri lia tre aparta esperantisteco.

**Tute verkita kaj kompilita per senpagaj linuksaj rimedoj: OpenOffice Writer, Gimp kaj Scribus.**

**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**
ISSN 1697-6460